

HORIZONTO

*KULTURA KAJ INFORMA REVUO
DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO*

**6-a Jaro N-ro 35 (5)
Septembro - Oktobro 1981**



REZOLUCIO DE LA 7-a INTERNACIA KONFERENCIO DE N.E.M.

KRONOLOGIA SINSEKVO DE LA FAKTOJ

RENKONTIĜO KUN IVO LAPENNA

KURSOJ EN LA UNIVERSITATO DE MANCHESTER, ANGLIO

HORIZONTO

KULTURA KAJ INFORMA REVUO
DE LA
NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO



Dumonata oficiala organo de la INTERNACIA
CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-
MOVADO (ICNEM).

Eldonata kaj presata de
ELDONEJO PERSPEKTIVO.

Ĉefredaktoro: *Jean Thierry*,
5 rue León Cogniet, F-75017 Paris, Francio

Redaktoro: *H. V. Rasmussen*,
Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danio.

Ĉiujn artikolojn kaj aliajn kontribuojn por la
revuo bonvolu sendi *nepre* al la ĉefredaktoro.
La redakcio rezervas la rajton mallongigi la
tekstojn kaj korekti la lingvon.

Abonojn akceptas la perantoj de HORIZONTO
aŭ rekte la ELDONEJO PERSPEKTIVO,
Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio.
Postĉekkonto: Kopenhago 9 32 95 95.

Jara abono por ĉiuj landoj: 100 danaj kronoj
aŭ ronda egalvaloro. Tiu abono ne inkluzivas
membrecon de ICNEM. Vidu la antaŭlastan
kovrilpaĝon.

Por *recenzo* bonvolu sendi 2 ekzemplerojn, por
mencio 1 ekzempleron de libro aŭ broŝuro.

HORIZONTO akceptas ankaŭ *anoncojn*
laŭ la suba tarifo:

1/1 paĝo 200 dkr., 1/2 paĝo 100 dkr. kaj
1/4 paĝo 50 dkr.

ENHAVO

Rezolucio de la 7-a I.K. de N.E.M.	97
Kronologia Sinsekvo de la Faktoj	98
7-a Internacia Konferenco de N.E.M. -	
Konciza Raporto (<i>H. V. Rasmussen</i>)	100
Esploro kaj Dokumentado (ED)	
(<i>Prof. D-ro Ivo Lapenna</i>)	105
Impresoj de iu Konferencanino	
en Humlebæk (<i>s-ino Marianne Muller</i>) ...	107
Elli Taskinen - 75-jara	110
ED (<i>daŭrigo</i>)	111
Urnes-Stilo (<i>H. V. Rasmussen</i>)	116
Renkontigo kun Ivo Lapenna	
(<i>Eugène de Zilah</i>)	117
Kursoj de la universitato de	
Manchester, Anglio (<i>Bernard Cavanagh</i>) .	118
Tra la Esperanto-Gazetaro (<i>Jean Thierry</i>)	119

Frontpaĝa bildo: La prez. de I.C.N.E.M., Prof.
D-ro *Ivo Lapenna*, dum sia Inaŭgura Parolado
kaj la prez. de la Konferenco, s-ro *Jean Thierry*.

PERANTOJ

Aŭstrio:

D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz.
Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono: 230 ŝil.

Britio:

Geoffrey King, 12 Elmer Close, Enfield Mid-
dlesex EN2 7EZ. Pĉk. 37.507.9106.

Jarabono: 7 anglaj pundoj.

Danio:

Eldonejo Perspektivo, Nørregårdsvej 91,
DK-2610 Rødovre. Pĉk. 9 32 95 95.

Jarabono: 100 d.kr.

Francio:

Marie Thierry, 5 rue León Cogniet,
F-75017 Paris, Francio.

Jarabono: 75 ffr.

FR Germanio:

Rudolf Helmke, Wiesenstrasse 9, D-4773
Möhnesee-Günne. Konto Nr. 31 377 450
Sparkasse Möhnesee (BLZ 414 514 85).

Jarabono: 33 DM.

Grekio:

Adda Sakellaroupoulou, Sokratous 88, Omo-
nia, Ateno 101. Jarabono: 380 dr.

Hispanio:

Luis Hernández-Yzal, D-ro Zamenhof St. 12
San Pablo de Ordal (Barcelona).

Jarabono: 600 pesetoj.

Israelo:

Ben-Alter Jehiel, P.O.B. 379, Petah Tikva. Pĉk
Bank Hadoar, 4-45854-8.

Jarabono: 120 shekel

Jugoslavio:

Prof. d-ro Oton Pancer, Vočarsko Naselje 10
YU-41000 Zagreb. Jarabono: 200 n.din.

Kanado:

Kriss Smilga, 34 Martin Road. Toronto Ont
M4S 2V2. Jarabono: 20 dol.

Luksemburgo:

Albert Wickler, 1 rue de Kehlen, L-Olm. Pĉk
54175-49. Jarabono: 540 lfr.

Nederlando:

Marianne Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70, I.F-
3015 BC Rotterdam Jarabono: 36 n.gld.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al la Administraci-
o aŭ al unu el tiuj perantoj, ĝis peranto en ti-
lando estos trovita.

GRAVA RIMARKO: Oni akceptas abonojn
nur por la tuta kalendara jaro.

REZOLUCIO

de la

7-a Internacia Konferenco de N.E.M.

La 7-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, okazinta en Humlebæk, Danlando, de la 12-a ĝis la 18-a de julio 1981, pritraktinte la ĉeftemon "La 100-jara Datreveno de la Internacia Lingvo (Esperanto) en 1987" en formo de prelegoj kaj diskutoj,

- 1) aprobas senŝanĝe la Skizon de Baza Programo por la Jaro de la Internacia Lingvo (Esperanto) 1887-1987 publikigitan en "Horizonto" n-ro 4/1981 kaj la koncernan tezon de la iniciatinto aperintan en "Horizonto" n-ro 3/1981 (en la plua teksto Baza Programo kaj Tezaro);
- 2) notas, ke la iniciato ricevis favoran eĥon en diversaj Esperanto-medioj, i.a. plenan aprobon de prof. G. Waringhien, la multjara prezidanto de la Akademio de Esperanto, kaj atendas, ke la vastaj tavoloj de la esperantistaro, sciiginte pri la iniciato, fervore apogos ĝian realigon;
- 3) aprobas la agadojn de la Loka Organiza Komitato de la Konferenco diskonigi la ĉeftemon kaj la tezon per komunikoj al la Esperanto-gazetaro kaj apartaj cirkuleroj, tute speciale la invitojn de la 13-a de aprilo 1981 al UEA kaj SAT reprezentiĝi en la Konferenco por pridiskuti la eblecojn de komunaj agadoj laŭ la ideoj de la Baza Programo;
- 4) konstatas kun plezuro, ke Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj donas sian plenan apogon al la iniciato kaj al la Baza Programo, kaj ke ambau organizaĵoj partoprenis en la laboro de la Konferenco pere de siaj reprezentantoj;
- 5) konstatas, same kun plezuro, ke la Plenum-Komitato de SAT per sia letero de la 7-a de majo 1981 akceptis la inviton sendi reprezentanton al la Konferenco, sed bedaŭras, ke SAT pro la negativa redakcia noto en la junia numero de "Esperanto", la oficiala organo de UEA, kiun SAT interpretis kiel "bedaŭrindan" rifuzon de UEA reprezentiĝi en la Konferenco, decidis ne sendi sian reprezentanton;
- 6) rimarkigas, ke la Estraro de UEA ne respondis per unusola vorto al la invito de la 13-a de aprilo 1981, kaj ke ne estas klare, ĉu la misprezenta redakcia noto en la junia numero de "Esperanto" estas farita laŭ instrukcio de la Estraro, aŭ kun ĝia aprobo, aŭ sen kia ajn ĝia scio. Tial la Konferenco atendas, ke kompetenta organo de UEA precizigos sian pozicion per klara respondo al la provizora Plenuma Komitato de Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado je la adreso de ĝia sekretario-kasisto;
- 7) atentigas ankoraŭfoje, ke la Baza Programo povas esti realigita nur per komunaj fortoj de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj -instancoj uzantaj la Internacian Lingvon, kaj ke la 100-jara datreveno de Esperanto estas unika okazo por kunligi ĉiujn fortojn de la Esperanto-movado ĉirkaŭ tiu speciala celo en la intereso de la Internacia Lingvo Esperanto kaj de ĝiaj pliaj progreso kaj disvastiĝo.

Prezidentaro de la Konferenco

Jean Thierry
prez.

Marianne Vermaas
vicprez.

H. V. Rasmussen
sekr.

Prof. D-ro Oton Pancer
vicprez.

KRONOLOGIA SINSEKVO DE LA FAKTOJ

La prezidanto de la Loka Organiza Komitato de la 7-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado per leteroj de la 13-a de aprilo 1981 invitis la asociojn UEA kaj SAT reprezentiĝi en la Konferenco:

"Ni aldonas, plie, presprovaĵon de la tezararo por la enkonduka prelego farota de Prof. D-ro Ivo Lapenna. La tezararo estos publikigita en la baldaŭ aperonta n-ro 3/81 de la revuo "Horizonto". Skizo de la Baza Agadprogramo por la Esperanto-Jaro estos publikigita en "Horizonto" n-ro 4/81.
Ni invitas vin sendi al la Konferenco rajtigitan reprezentant(in)on, aŭ plurajn laŭ via deziro, por priparoli kun ni la unuajn paŝojn de tiu iniciato kaj vidi, ĉu komuna agado por tiu speciala celo estos ebla, kiel ni esperas."

Al la invito SAT pozitive respondis la 7-an de majo 1981:

"Ni priraktis en la hieraŭa kunsido de nia Plenum-Komitato la enhavon de via letero de la 13. aprilo.
Ni decidis respondi pozitive al via invito sendi reprezentanton al via 7a Konferenco en julio por partopreni en preparlaboroj por inda memorigo de la centjareco de Esperanto en 1987.
Tamen ni ankoraŭ ne povis elekti la koncernatan personon, kiu plenumus tiun rolon nome de nia P.K.
Ni reskribos kiel eble plej baldaŭ."

Bedaŭrinde ne venis respondo de UEA ...

Per letero de la 4-a de junio 1981 SAT informis, ke ĝi rekonsideris sian partoprenon:

"En sia kunveno de la 3-a de junio, la Plenum-Komitato de SAT denove traktis vian proponon sendi al la 7-a Konferenco de N.E.M. sian reprezentanton por partopreni en preparlaboroj por inda memorigo de la centjareco de Esperanto en 1987.

Kiel jam dirite en nia letero de la 7-a de majo, la PK estas preta sendi sian reprezentanton kondiĉe ke ankaŭ la aliaj E-Asocioj (U.E.A. ktp) sendu la siajn. Se la aliaj Asocioj rifuzas partopreni tiun diskuton, la PK de SAT trovas senutile ke okazu diskuto nur inter NEM kaj SAT."

Tiam la prezidanto de la LOK precizigis la situacion en letero de la 17-a de junio 1981:

"En via letero de la 4-a de junio 1981 vi sciigis, ke vi nun opinias reprezenton de SAT en nia konferenco senutila, se ne ankaŭ UEA estos reprezentita, kaj petis nin informi pri la respondo de UEA al nia invito.

De UEA venis nenia respondo, kio sendube signifas, ke la asocio ne intencas sendi reprezentanton al la konferenco. Ni povas aldoni, ke krom ICNEM la Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ) estos reprezentita. Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) ne anoncis reprezentanton, sed estrarano, prof. P.E. Kustaanheimo, aliĝis al la konferenco."

Sed en la junia numero de "Esperanto", la oficiala organo de UEA, aperis jena noto de la redakcio:

"Cetere, trovu ĉi tie ankaŭ nian bedaŭron, ke necesis post tiom da jaroj reveni al tiu kontraŭmovada movadeto, kiu dum jaroj malsukcese provas semi malamon kaj netoleremon ene de la unueca Esperanto-movado. Atentu, tiuj volus inviti vin en 1987 al iu fantoma "Monda Kongreso de Esperanto", ie en "neŭtrala" mondo. UEA, kies Estraro jam de kelkaj jaroj prilaboras la programon por la 100-jara jubileo de Esperanto en 1987, baldaŭ informos vin pri siaj planoj, ĉar oni ja ne povas festi la jubileon de Esperanto ekster la Esperanto-movado. Fine, pardonu la galon de ĉi tiuj linioj."

Pluraj esprimoj estas nuraj mensogoj!

"Kontraŭmovada movadeto" - NEM neniam deklaris sin kiel konkurenca asocio, kaj se io semas "malamon kaj netoleremon", tio estas ja tia noto de redaktoro.

"Monda Kongreso de Esperanto" - Neniel la invito pretendas, ke NEM intencas organizi mem ian mondan kongreson, sed nur invitas ĉiujn asociojn organizi kune la centjaran datrevenon per internacia komitato.

"Ie en "neŭtrala" mondo" - Temas ja pri "neŭtrala lando" kiel Svislando, sed tute ne ia "neŭtrala mondo", kiu povas ekzisti nur en la fantazipovo de la redaktoro.

"(UEA-)Estraro jam de kelkaj jaroj prilaboras la programon por la 100-jara jubileo de Esperanto" - sed sur la 20-a paĝo de la Jarlibro de UEA 1981 elstaras jena mencio pri la komisiono por la 100-jara datreveno: "nomota"!

Kaj sekve de la redakcia noto aperinta en "Esperanto" venis de SAT nova letero de la 2-a de julio 1981, kiu cetere substrekas la "galecan" stilon de la redaktoro:

"Ni pritraktis en hieraŭa Plenum-Komitata kunsido la enhavon de via letero de 17-a de junio, sekvo de nia de 4. junio. Bedaŭrinde konfirmiĝis, ke UEA ne sendos reprezentanton al via Konferenco, kiel ni ĉiuj povis legi en la junia n-ro de ESPERANTO, en tre "galeca" stilo. Sekve ni restas ĉe nia decido, en tiuj cirkonstancoj ne sendi reprezentanton oficialan de nia Asocio al via konferenco."

Konkludo venas per si mem: ni povas nur bedaŭri el vidpunkto de la interesoj de Esperanto!

SOLIDARECO!

Dum nia Konferenco en Humlebæk kolektiĝis por Pollando mil danaj kronoj. Se iam ni montru nian esperantistan solidarecon, estu kiam niaj gesamideanoj malsatas. — Oni povas sendi sian monkontribucion al la redakcio de *Perspektivo*, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio.

Se vi jam estas abonanto de "HORIZONTO" donacu abonon al amiko en Orientaŭropo.

Tie kun streĉa atento oni legas la revuon!!

7-a INTERNACIA KONFERENCO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Konciza raporto

En la ĉarma kadro de Altlernejo Krogerup en Humlebæk, Danio, okazis la 7-a Internacia Konferenco de N.E.M. de dimanĉo la 12-a ĝis sabato la 18-a de julio 1981. Ĝia ĉeftemo estis la 100-jara Datreveno de Esperanto en 1987.

Malfermo

La malferman kunvenon, dimanĉon vespere, enkondukis la prezidanto de la Loka Organiza Komitato, H.V.Rasmussen, per bonveniga parolado, en kiu li i.a. esprimis la esperon, ke la Konferenco malgraŭ la nereprezentiĝo de UEA kaj SAT ne perdu la energion kaj iniciaton, sed klopodu per serioza diskutado atingi la kiel eble plej utilan rezulton. Post memorigaj vortoj pri S-ino Anna Dratwer kaj D-ro Georges Salan, forpasintaj post la antaŭa konferenco, kaj lego de saluta letero de Mag. Isaj Dratwer la prezidanto deklaris la konferencon malfermita.

Laŭ propono de la LOK la Konferenco aklame elektis prezidantaron konsistantan el S-ro Jean Thierry (prezidanto), F-ino Marianne Vermaas (vicprez.), Prof. D-ro Oton Pancer (vicprez.) kaj S-ro H.V. Rasmussen (sekretario).



Sekvis la inaŭgura parolado de la prezidanto de Internacia Centro de N.E.M., Prof. D-ro Ivo Lapenna, pri la temo *Survoje al la 100-jara Datreveno de la Internacia Lingvo (Esperanto): Atingoj, Malsukcesoj, Obstakloj*, pri kiu vidu sube.

Post la malferma kunveno okazis Interkona Vespere plena de la amika kaj harmonia atmosfero, kiu regis dum la tuta konferenco.

La prezidanto de I.C.N.E.M.: Prof. D-ro Ivo Lapenna dum sia Inaŭgura Parolado.

Survoje al la jubileo

Juĝisto *Sven Ziegler* prelegas.




La prelegoj kaj diskutoj pri la ĉeftemo pritraktis du grupojn de temoj: 1) la ĝisnunan evoluon kaj la nunan situacion, 2) la preparadon de la jubileo en 1987.

Al la unua grupo apartenis la inaŭgura parolado de Prof. D-ro *Ivo Lapenna* kaj la prelegoj de Juĝ. *Sven Ziegler*, Prof. D-ro *Paul Neergaard* kaj S-ro *Jean Thierry*.

En la inaŭgura parolado la prezidanto akcentis, ke la ĉefa sukceso de Esperanto estas la lingvo mem, evoluinta plene por servi al siaj celoj, kaj ke la malsukcesoj kaj obstakloj havas sian kaŭzon en nekompreneo pri la reala situacio en la mondo de Esperanto kaj pri ĝia rolo en la socio. Inter la venkendaj negativaj elstaras la tendencoj rezultigintaj la eventojn en Hamburgo en 1974 kaj la postan evoluon en UEA ilustritan kaj ilustritan per ekzemploj sub *Esploro* kaj *Dokumentado* en *Horizonto*.

Tiun brilan prezenton de la ĝenerala situacio suplementis en eminenta maniero la 3 postaj prelegoj en tiu grupo (lundon kaj mardon) pri la temoj *Lingvaj Malhelpoj al Okcidenteŭropa Ekonomia kaj Kultura Kunlaboro* (Ziegler), *Ĉu la Lingvo-diverseco Damaĝas la Teknologian kaj Ĝenerale Ekonomian Helpon al la Landoj de la Tria Mondo?* (Neergaard) kaj *La Pozicio de la Franca Kompare kun la Angla kaj Aliaj Naciaj Lingvoj en la Monda kaj Regionaj Interŝtataj Organizaĵoj* (Thierry).

D-ro *Paul Neergaard*
preleginto de la Konferenco.



La konferencanoj tre interesite aŭskultis kaj poste diskutis la prelegojn, kiuj havis abundon da informoj pri la lingva situacio internacie efike utiligeblaj en la informado pri Esperanto, kaj de multaj flankoj esprimiĝis la deziro pri publikigo de la prelegoj. La alta kvalito de la prelegoj estas komprenebla pro la profunda faka scio kaj vastaj spertoj de la prelegantoj, kiuj konsentis pri publikigo fare de N.E.M.. Kiel sube informite, la ĉefkunveno de ICNEM decidis eldoni la prelegojn kiel erojn de broŝura serio, kaj tial estas superflue referi ilin tie ĉi. (La manuskripto de la prelego de S-ro Thierry estas jam liverita al la presejo de Eldonejo Perspektivo, kaj la pretigado de la du aliaj prelegoj komenciĝos tuj, kiam la aŭtoroj estos finpolurintaj siajn manuskriptojn).

Aŭskultantoj en la prelegejo.



La jubileo en 1987

La pritrakto de tiu temo komenciĝis lundon per prelego de Prof. D-ro Ivo Lapenna sub la titolo *Bazaj Ideoj pri la Kadra Programo por la Celebrado de la Datreveno de Esperanto en 1987 Cele al Amasa Plua Disvastigado de la Internacia Lingvo*, en kiu li punkton post punkto klarigis kaj komentis la Skizon de Baza Programo publikigita en la antaŭa numero de *Horizonto*, emfazante kun referenco al antaŭaj kampanjoj de la Esperanto-movado, ke la tuta programo estos realigebla, se ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj -instancoj lojale kaj celkonscie kunlaboros.

La fono de la diskuto pri la Baza Programo kompreneble estis alia ol la intencita, ĉar UEA sen respondo al la invito ne sendis reprezentanton al la Konferenco, kaj ĉar pro la sinteno de UEA ankaŭ SAT ne reprezentis (vidu la antaŭan artikolon pri la Kronologia Sinsekvo de la Faktoj). Ekster ĉia dubo N.E.M. - kiu cetere ne pretendis voli ludi gvidan rolon - ne estas sufiĉe forta por sola realigi pli ol parteton de la planoj.

Ĉar ne estis klare, ĉu la redakcia noto en *Esperanto* esprimas la oficialan sintenon de la estraro de UEA, la Konferenco opiniis prave rigardi "la pordon ankoraŭ nefermita", esperante, ke plu ekzistas la ebleco, ke UEA akceptos la "etenditan manon", tiel ke vasta kunlaboro pri la programo povos efektiviĝi. La plua pritrakto okazis en la kadro de la ĉefkunveno de la Centro.

Ĉefkunveno de I.C.N.E.M.

La ĉefkunveno okazis en tri partoj, mardon, merkredon kaj vendredon. Ĝin prezidis Prof. D-ro Ivo Lapenna, prezidanto de la Centro. La kunveno estis malfermita al ĉiuj konferencanoj - laŭprincipe kaj pro eroj de la tagordo apartenantaj ankaŭ al la temaro de la Ĝenerala Diskuto. Ĉar al la membroj de la Centro estos dissendita la Oficiala Raporto pri la ĉefkunveno, ĉi tie estas donita nur mallonga raporto pri la decidoj.

Financaj raportoj. Post pritrakto de la financa raporto pri la periodo 1.8.1980-30.6.1981 la kunveno decidis, ke al la venontjara ĉefkunveno estu prezentita financa raporto pri la periodo 1.8.1980-31.12.1981, kaj ke estonte la raporta periodo estu la kalendara jaro. S-ro Kaj Røssum estis elektita revizoro por la unua periodo.

Regularo de la Internaciaj Konferencoj de N.E.M. En la Regularo, art. 2, Celoj, estis ŝanĝita alineo 2.4, kiu post la ŝanĝo tekstas: *"Atingi, ke UEA, t.e. ĉiuj organizaĵoj kaj unuopuloj apartenantaj al ĝi, respektu kaj respektigu la partipolitikan neŭtralecon de la Asocio, kiel ĝi estis formulita en la antaŭa Statuto valida ĝis 1980, unuavice art. 4 kaj 13, post kio aŭtomate ĉesos la neceso plu okazigadi la Konferencojn."*

En art. 9, Programoj, la komenco de alineo 9.3 post la akceptita ŝanĝo estas formulita jene: *"La organizaĵoj estas pritraktataj laŭ tagordo, kiun fiksas la LOK interkonsente kun la Plenuma Komitato de la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado, kaj kiu..."*

La ŝanĝita teksto de art. 16, Deponejo, estas: *"La Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado estas komisiita funkcii kiel deponejo de ĉiuj oficialaj dokumentoj de la Konferencoj."*

Preparlaboroj por la Esperanto-Jaro 1987. Pritraktinte la Skizon de Baza Programo kaj la pozitivajn kaj negativajn reagojn al ĝi, la kunveno akceptis deklarojn, kiuj poste en precizigita formo eniris en la Rezolucion kiel punktojn 1, 3, 5 kaj 6.

Elektado de Plenuma Komitato. La PK funkcia post la Konferenco en Strasburgo estis elektita provizore por nur unu jaro anstataŭ por la laŭstatuta periodo, 3 jaroj. La prezidanto nun deziris transdoni sian taskon al alia, sed neniuj aliaj kandidatoj por la elekto estis troveblaj. La rezulto de la diskuto estis kompromiso: la PK estis reelektita kiel provizora por unu jaro. La listo de PK-anoj sur la antaŭlasta kovrilpaĝo do restas sensanĝa.

Diversaĵoj. Estis decidite, ke laŭ la konsento de la prelegintoj la prelegoj de Sven Ziegler, Paul Neergaard kaj Jean Thierry estos eldonitaj en broŝura serio.

Plie la ĉefkunveno akceptis, ke la Centro kovru la antaŭvideblan deficiton de la Konferenco.


Aliaj aranĝoj

Ekster la Esperanta temaro merkredon vespere D-ro Erik Høg prelegis kun lumbildoj pri *Vojaĝo en la Universo*, prezentante en bonega popolarscienca maniero interesojn de la astronomio kaj provokante multajn demandojn de la aŭskultantoj pri la misteroj de senfineco kaj eterneco.

Post la prelego estis t.n. ĝardeno festo - pro la vetero en la granda salono - en kiu ĉeestis ankaŭ nekonferencanaj gastoj, i.a. la familio Kehlet el Antverpeno (Eliza Kehlet, estraranino de UEA, Torben Kehlet, eldonisto de la TK/Stafeto-libroj kaj la revuo *Monato*, kaj la gefiloj).

La Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ) havis sian ĉefkunvenon lundon, la tuta ĵaŭdo estis rezervita por ekskursoj, kaj en la vesperoj estis kulturaj kaj distraj aranĝoj, pri kiuj ni referencas al la artikolo de "iu konferencanino".

Laborkunsido. De maldekstre: Prof. D-ro O. Pancer, D-ro Paul Neergaard, Prof. D-ro Ivo Lapenna, s-roj H.V. Rasmussen, Sven Ziegler kaj Jean Thierry.



Ferma kunveno

Pro foriro jam la postan matenon de pluraj konferencanoj estis decidite okazigi la ferman kunvenon jam vendredon posttagmeze. La kunveno akceptis la Rezolucion de la Konferenco (vidu p. 97), post kio la prezidanto, S-ro Jean Thierry, deklaris la Konferencon fermita.

Venontjara Konferenco

Oni sendube rimarkis, ke en la supra raporto aperis neniuj mencioj pri elekto de loko de la 8-a Konferenco. La kaŭzo estas, ke la informoj pri la eblecoj estis nesufiĉaj, kial la PK de la Centro ricevis la komision findecidi pri tio.

Ni povas nun informi, ke S-ro Luis M. Hernández Yzal en Sant Pau d'Ordal (provinco Barcelona) en Hispanio - la estro de la *Hispana Esperanto-Muzeo* - akceptis la taskon organizi la Konferencon en la unua semajno de aŭgusto 1982. Detaloj aperos en la sekvanta numero de *Horizonto*.

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)

Redaktas Prof. D-ro IVO LAPENNA

N-ro 34

52. RAPORTO DE LA ESTRARO DE UEA POR 1980

52.1. Enkonduka Rimarko

Denove ĝi aperis en *Esperanto* anstataŭ en la *Jarlibro*, ĉifoje kun la "maja saluto" (unua-maja?) de la redaktoro sur la kovrilpaĝo. La Raporto okupas 14 paĝojn. Tio signifas ŝparon je la kostoj de la Membroj-Abonantoj, kiuj tiel estas senigitaj de preskaŭ unu tuta n-ro de la revuo. Antaŭ Hamburgo (1974) la Raporto estis ĉiam presata ne nur en la *Dua Parto de la Jarlibro* (ĝi ne plu aperas), kiun ricevadis ĉiuj individuaj membroj, sed ankaŭ kiel aparta broŝuro. La nuna Raporto - same kiel la antaŭaj en la posthamburga periodo - montras, ke ankaŭ la nova gvidantaro, elektita en 1980, komplete neglektas tiujn multnombrajn esencajn agadojn, kiuj bonege funkciis ĝis la eventoj de 1974, kaj ke ĝi ne sukcesis iniciati kaj realigi unusolan novan. Tuta n-ro de *Horizonto* sufiĉus por analizi tiun Raporton pri neagadoj kompare kun la iamaj vastaj kaj ĉiudirektaj aktivadoj konforme al la tiama demokratita Statuto, la tri bazaj kaj pluraj okazaj laborprogramoj. Tio estus malŝparo de nia tempo kaj de valora spaco en *Horizonto*. Tial ni limigos nin al kelkaj komentoj pri la plej gravaj aspektoj, ofte lasante la parolon al la Raporto mem, kiu, pretere dirite, estas verkita de nekonata funkciulo (verŝajne oficisto de la CO) kaj eĉ ne estas subskribita de la prezidanto kaj ĝenerala sekretario.

52.2. Iom pri Ĝeneralajoj kaj Administrado

El tiuj ĉapitroj oni ekscias, ke la nombro de aliĝintaj landaj asocioj kreskis al 43. Aliflanke, la nombro de la Asociaj Membroj (AM) malkreskis, ĉar en 1980 UEA fakte havis nur 20.490 AM kompare kun 22.379 en 1973, kiel montrite en *Horizonto* n-ro 3/81, p.62. Multe pli grave estas, ke la nombro de Individuaj Membroj (IM), nun 6.629, plu troviĝas malproksime de la 7.231 IM en 1973. Oni ankaŭ sciigas, ke en la CO laboris 9,4 geoficistoj, ke la tegmento de la domo estas riparita (dum "la cetero estas prokrastita"), ke la *Jarlibro* "aperis nur en julio, kaj ne kiel celate en aprilo" (la ĉijara ankoraŭ ne aperis); ke la Komitato, same kiel en la pasintaj jaroj, elektis plurajn novajn Honorajn Membrojn, tiel ke ilia nombro nun fakte estas rekorda - la sola vera rekordo. Inter la honorigitoj oni trovas la nomon de S-ro N. Aleksiev (Bulgario), kies sola elstara "merito" por UEA, laŭ nia scio, estas la organizo de la antaŭhamburga partipolitika komploto kaj la hamburga puĉo kun la konataj negativaj sekvoj, kiujn reflektas ankaŭ la pri-

traktata Raporto. Pro tiu "sukceso" kaj pro siaj aktivadoj en la sovetisma t.n. Mondpaca Esperanto-Movado li jam pli frue ricevis altajn partiajn/ŝtatajn honorigojn en Bulgario. Oni povas preskaŭ kun certeco antaŭvidi, ke la nombro de HM progresie kreskos ankaŭ en la sekvantaj jaroj, kaj ke baldaŭ oni komencos aldonadi al ili ankaŭ novajn honorajn prezidantojn. Tiurilate la posthamburgaj komitatoj estas tre malavaraj.

Por verki kaj akceptigi la novan kontraŭneŭtralecan Statuton - krome fuŝaĵon ankaŭ el aliaj vidpunktoj - la posthamburgaj gvidantaroj bezonis pli ol 5 jarojn! Nun oni sciiĝas, ke post pliaj 18 monatoj "la Ĝenerala Regularo ankoraŭ atendas revizion", kio verŝajne signifas, ke UEA laboras laŭ la nova Statuto, sed samtempe plu aplikas la malnovan Ĝeneralan Regularon. Sed ĝi plu "laboras" senplane, ĉar "la Estraro transprenis la komision pretigi strukturon de la 4-a Baza Laborplano, laŭ kiu plulaboru la Komisiono pri Planado"! Do, pli ol 6 jarojn post Hamburgo la Estraro eĉ ne pretigis la "strukturon" de la nova Laborplano por ne paroli pri la "plulaborado" de la Komisiono pri Planado laŭ tiu ankoraŭ ne ekzistanta "strukturo" por fine, eble post pliaj 3-4 jaroj, prezenti projekton de propono, pri kiu oni siavice "diskutos" dum kelkaj pliaj monatoj aŭ jaroj, ktp. Vere, se ne estus tragike, estus tre komike. En tiaj kondiĉoj alproksimiĝas la 100-jara datreveno de Esperanto en 1987.....

52.3. Pri Informado kaj CED

Jam dum jaroj nenio estas farata sur la kampo de informado, iam bonege organizita, harmoniigita kaj efike funkcianta sur la internacia, landa, loka kaj faka niveloj. La kompletan neglekton de tiu ĉi esence grava agadbranĉo ilustras jenaj laŭvortaj eltiraĵoj el la Raporto mem:

"Ĝuste sur ĉi tiu kampo estas aparte malfacile difini kiu devas plenumi kiun informan taskon"(!) - "Estis diskutitaj ankaŭ ideoj pri eldono de internacie uzeblaj informiloj, ekz. afiŝoj, kiuj preskaŭ plene mankas en la merkato" - "La iam bone konata kaj nun preskaŭ forgesita seslingva flugfolio de UEA ankoraŭ atendas sian reeldonon" . "Internacia Gazetara Servo (IGS) produktis nur kelkajn novaĵbulletenojn en 1980" (kiom?) - "La eldonado de Esperanto-Dokumentoj stagnis" - "En Stokholmo ne funkciis la Esperanta branĉo de la Kongresa Gazetara Servo, kion oni de pluraj flankoj forte kritikis" - "Ankoraŭ mankas internacia kunordiganto de ĉi tiu agadformo" (t.e. prelegvojaĝoj) - "Neniu statistikis internacie la radioelsendojn pri Esperanto. Same pri la televido" (kaj kion ajn alian) - "Necesas rezigni pri teorumado kaj simple produkti kelkajn bazajn helpilojn, kiel ekzemple tiun seslingvan faldfolion kaj internacie uzeblan afiŝon" (la sola saĝa diro en la Raporto).

Tio, do, estas la rezultoj, vere ŝokaj, malgraŭ la diversaj komisionoj pri informado, planado ktp., dum jaroj elektataj kaj reelektataj, diskutantaj kaj rediskutantaj senespere en seneliraj sakostratoj. Oni komparu la nunan staton kun la antaŭhamburgaj aktivadoj ankaŭ sur tiu ĉi kampo per relego de la tiutempaj statistikoj kaj precizaj informoj pri la plenumitaj laboroj (ne pri "ideoj", "projektoj de proponoj", "diskutoj" k.s.) en kiu ajn el la Estraraj Raportoj por la periodo 1950-1974 aŭ en la respektivaj partoj de *Esperanto en Perspektivo*.



S-ino Marianne Muller

IMPRESOJ de iu konferencanino en Humlebæk

Duan fojon konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado okazis en Humlebæk. Jam, en la jaro 1977-a, ni povis sperti la taŭgecon de la Altlernejo Krogerup kiel konferencejo: nek magazenoj, nek turistaj allogaĵoj en la tuja najbaraĵo tentas la homojn por forlasi la prelegojn. La konstruaĵo ja staras meze de granda, bela parko, sed la aĉa vetero ne invitis al promenadoj en la malseka verdaĵo. Verdire mi esperis, ke la pluvo jam abunda en la 1977-a ne same surŝutos nin en tiu ĉi jaro. Vana espero!

Sed tiu ĉi ekstera etoso absolute ne influis la internan, kiu estis varma kaj amika, same kiel estas ĉiam la etoso de la N.E.M.konferencoj. La ĉi-jaran 7-an Konferencon ne partoprenis multe da homoj. Sed tiuj, kiuj ĉeestis, estis entuziasmaj, sindonemaj kaj plejparte spertuloj pri la afero Esperanto.

Kun granda plezuro kaj intereso ili aŭskultis la prelegojn de sia Prezidanto, Prof. D-ro Lapenna, kiel ĉiam preta por dediĉi ĉiujn siajn fortojn al la Internacia Lingvo. La Inaŭguran Paroladon enkondukis parto de la 6-a Simfonio de Beethoven. Tio jam envolvis la ĉeestantaron en solena etoso, kiu estis pludaŭrigita per la vortoj de Prof. D-ro Lapenna komencanta sian paroladon tiele: (mi citas de memoro!) *"Beethoven, kies parton de la 6-a simfonio vi ĵus aŭdis, vivos longe, longe, longe, kiam estos komplete malaperintaj iuj modernaj komponistoj, kiuj detruas per sia muziko la orelon kaj la normalan muzikan senton..."*.

Mi petas Prof. Lapenna bonvolu pardoni al mi, se mi ne fidele citas lian frazon; sed estas malfacile memori pri ĉio!!

Aliaj prelegoj multe interesis la partoprenantojn. Mi mencios: - de s-ro Sven Ziegler: *Lingvaj Malhelpoj al Okcidenteŭropa Ekonomia kaj Kultura Kunlaboro*.

- de Prof. D-ro Paul Neergaard: *Ĉu la Lingvo-Diverseco Damaĝas la Teknologian kaj Ĝenerale Ekonomian Helpon al la Landoj de la Tria Mondo?*

Interalie Prof. Neergaard akcentis, ke jam miloj da personoj mortis pro malbona kompreno de la instrukcioj sur la medikamentoj senditaj al la Tria Mondo.

- de S-ro Thierry: *La Pozicio de la Franca kompare kun la Angla kaj aliaj Naciaj Lingvoj en la Monda kaj Regionaj Interŝtataj Organizaĵoj*.

S-ro Thierry interalie menciis per ekzemploj la gravajn erarojn okazintajn pro malĝusta tradukado.

- de D-ro Erik Høg: *Vojaĝo en la Universo.*


D-ro Høg montris al ni elstarajn fotojn de la Universo kaj almetis siajn sciojn je dispono de la ĉeestantaro, verŝajne plejofte ne spertuloj sur tiu ĉi kampo! La fotoj estis tiel impresaj, ke ni ĉiuj havis malfacilecon reveni "sur teron"!

Ĉiuj prelegoj estis altnivelaj same kiel tiuj, kiuj okazis en la antaŭaj Internaciaj Someraj Universitatoj dum la Universalaj Kongresoj de U.E.A.

Du prelegintoj antaŭ la enirejo de
la konferenca palaceto. Krogerup:
Prof. D-ro Ivo Lapenna kaj
D-ro Erik Høg.



La juna generacio: Kristian Elias Trørup,
Elise Thierry kaj Pierre Zacho.



Tamen la prelegoj ne malhelpis, ke en aliaj momentoj la konferencanoj pasigis tre agrablajn okazaĵojn. La organizantoj ne ŝparis sian laboron por pretigi al ni solenajn festojn pere de ruĝaj kandeloj, samkoloraj buŝtuketoj (kelkfoje bluaj, kiuj belege kontrastis la ruĝajn kandelojn). Vespere kafo kaj teo neniam mankis. Eĉ ege bongusta "sangria" ne mankis. Dume oni amuziĝis ĉu per "Anekdota Konkurso", ĉu per poeziaĵoj...

BONGUSTA SANGRIA!



La prezidanto de la loka
Konferenca Komitato,
s-ro H.V. Rasmussen,
kaj la prezidanto de
I.C.N.E.M., Prof. D-ro
Ivo Lapenna, dum agrabla
kunesto.



S-ro Peter Zacho kaj
s-ino Ingrid Muller



S-ro Borge Hansen,
s-ino Elisabeth Nord-
ström kaj s-ro Kaj
Røssum (trezoro de
I.C.N.E.M.)



Prof. D-ro O. Pancer kaj Jean Thierry

La promesita "ĝardenfesteto" kompreneble falis en la ĉiel-akvon, sed la festo tamen okazis en la prelegsalono, kiu estis belege ornamita per multkoloraj lampionoj, plejparte aranĝitaj de nia juna amiko Pierre Zacho, kiu ankaŭ prizorgis ian fonmuzikon per kasetoj. Cetere la arto estis bone reprezentita dum tiu ĉi Konferenco: krom muzikon, ni povis admiri pendigitajn sur la muroj de la konferencejo valorajn pentraĵojn de nia amiko Pierre Gaborit, profesia pentristo, kiu ankaŭ gvidis la viziton al la ĝardeno kaj al la muzeo Louisiana.

Plie, mi havas agrablan memoron pri la posttagmeza aŭtoekskurso kiu kondukis nin al nepre vizitinda kastelo Frederiksborg kaj plezurigis nin tra ĉarma arbaro apud Helsingør per dukilometra promenado, dum kiu la ĉielo bonvolis haltigi sian duŝon.

Mi devas aldoni ankaŭ ke dum tiuj feliĉaj tagoj ni ne forgesis la polajn gesamideanojn, kiuj malsatas, kaj ni faris kolekton por sendi al ili manĝpaketojn.

Mallonge oni povas diri, ke tiu ĵusa Konferenco de N.E.M. postlasis impreson de riĉenhava programo, fruktodona kunlaboro kaj feliĉiga kunestado inter ĉiuj partoprenantoj. Pro tio, mi estas certa paroli en la nomo de ĉiuj, kiam mi korege dankas la organizintojn, S-ron Rasmussen, Ges-rojn Peter Zacho, S-inojn Lis Thune kaj Birthe Zacho, S-rojn Pierre Gaborit kaj Pierre Zacho. Kun malmulte da rimedoj kaj multe da malfacilaĵoj ili okazigis mirinde belan Konferencon. Ni ne forgesos ĝin.

M.M.



★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

ELLI TASKINEN

75-jara — 28. aŭgust 1981

La 28-an de aŭgusto mag. pol. f-ino *Elli Taskinen*, Helsinko, fariĝis 75-jara. Ĝis la milito f-ino Taskinen estis tre aktiva en la Esperanto-movado en Finnlando. Kiel ĉefkontisto ŝi havis sian laboron en la Komerca Altlernejo de Helsinko. Tute nature la U.K. en Helsinko 1969 profitis el ŝiaj profesiaj spertoj sur la revizia kampo. Depost 1974 ŝi estas aktiva en la Neŭtrala Esperanto-Movado. La partoprenintoj en niaj du konferencoj en Humlebæk 1977 kaj 1981 povas atesti ŝian intelektan partoprenon en diskutoj, ŝian mildan naturon kaj ŝian ĉiaman oferecon. Postfeste ni sendas niajn plej korajn gratulojn!

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED) (*Daŭrigo desur paĝo 106*)

La Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), kiu dum sia funkciado ekde la fondiĝo en 1952 ĝis la fino de 1974 kolektis milojn da dokumentoj, publikigis plurajn centojn da dokumentoj en Esperanto kaj en naciaj lingvoj, eldonis kelkajn verkojn, interalie la monumentan *Esperanto en Perspektivo*, fakte ne plu ekzistas. En la parteto dediĉita al CED oni povas legi la subitan novaĵon, ke la Estraro de CED estis "provizora", kaj la daŭre ripetatan "novaĵon", ke "dum pluraj jaroj" ĝi "laboris", sed neniuj povas vidi kiajn rezultojn donis tiu "laboro". Nun, laŭ la Raporto, CED havas "pli multnombrajn kaj pli laborkapablan estraran teamon, sub la respondeco de la estrarano pri esploro kaj dokumentado, D-ro Tonkin". Tamen, la Raporto nenion diras pri la aliaj "teamoj", nek pri la ĝisnuna laboro ĉu de la nova "laborkapabla" estraro, ĉu sole de la respondeca estrarano, nek pri ia laborplano de CED, nek pri kio ajn alia rilate al CED. Kun escepto de la nomo, vere mallojale plu ekspluatata, tiu surpapera CED havas absolute nenion komunan kun la organiza strukturo, celoj, laborplanoj kaj realigoj de la ĝishamburga CED, kiu, tre bedaŭrinde por Esperanto, forpasis la 31-an de decembro 1974.

52.4. Aliaj Eroj

Estas menciinde, ke UEA plu konservas la konsultajn rilatojn kun Unesko, establitajn en 1954, kaj ke ĝi estis reprezentita en la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Beogrado (pri la karaktero de tiu reprezentiĝo v. punkton 44 en *Horizonto* 1/81, p. 22). Okaze de la akcepto de la reprezentantoj de UEA fare de la Ĝenerala Direktoro de Unesko, la delegacio transdonis al li la librojn aperintajn en la Serio Oriento-Okcidento, sed en la koncerna raporto oni "forĝesis" menci, ke ankaŭ tiu Serio estis iniciatita kaj realigita antaŭ 1974. La Fakto de UN pri Publika Informado eldonis la Esperanto-tradukon de la Ĉarto de UN kaj la Statuto de la Internacia Kortumo. Temas pri iom reviziita eldono de la samaj internacijuraj dokumentoj, kiujn siatempe eldonis UEA, sed la Raporto denove forĝegas aldoni, ke la unuan tradukon faris R. Harry, E. Svane kaj la red. de tiu ĉi rubriko, kaj ke la publikigon prizorgis Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj, sub kies aŭspicio la broŝuro aperis. Ĉie en la Raporto troviĝas mencioj pri diversaj pozitivaj atingoj, pri kiuj UEA havas nenian meriton. Tipa ekzemplo estas la informo pri la uzo de Esperanto kiel oficiala lingvo en la 9-a Internacia Kongreso de Kibernetiko. Tiaj kaj similaj atingoj, kiuj havas nenion komunan kun UEA, povus kaj devus esti menciitaj fine de la Raporto en iu ĝenerala trarigardo pri la stato de la Esperanto-Movado, kun klara indiko, ke ne temas pri agadoj de UEA. Aliflanke, se oni mencias alies agadojn kaj atingojn, kiel abunde faras la Raporto pro foresto de propraj, oni devis ne ellasi la tre utilan laboron de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj, la regulan publikigadon de *Internacia Jura Revuo*, enhave kaj lingve

la plej bona nuntempa faka Esperanto-periodaĵo, aŭ la fondon de Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado, aŭ la tre sukcesajn konferencojn de la sendependa N.E.M., aŭ la revuon *Horizonto*, kaj ĉion alian ligitan al la partipolitike neŭtrala kaj sendependa esperantismo.

Se oni esceptas la atingojn de aliaj kaj la raportitajn kutimajn administrajn rutinaĵojn, restas nur la eldonado de *Esperanto* (ofte kun prokrastoj), la publikiĝo de la *Jarlibro* (416-paĝa kompare kun la 720 paĝoj de ambaŭ partoj de la *Jarlibro* por 1973), la organizo de la UK kaj la bone funkcia *Libroservo* kiel la solaj pozitivaj aktivadoj kun konkretaj rezultoj, ĉefe komercaj-profitaj.

52.5. Financoj

La antaŭhamburgaj financaj raportoj konsistis el jenaj partoj: Spezoj, Bilanco, Detaligo de la Fondaĵoj kaj Kapitalaj Kontoj (interalie Propaganda Konto), Buĝeto, Konto de la UK, Konto de CED, Buĝeto de CED, Konto kaj Buĝeto de la prestiĝa *La Monda Lingvo-Problemo* (tiutempe eldonata de CED kaj plene sub ĝia kontrolo), Kontoj de TEJO kaj Bilanco de la Institucio Hodler, kiel ankaŭ, aldone, Konto de la Akademio de Esperanto. Ĉiu Financa Raporto estis kontrolita kaj subskribita de ŝtata revizoro kaj de la revizoroj elektitaj de la Komitato. Tia Financa Raporto donadis klaran kaj realecan bildon pri ĉiuj enspezoj kaj elspezoj, pri la rimedoj uzitaj por diversaj celoj, pri la tuta financa situacio. La nuna Financa Raporto konsistas nur el Spezokonto, Bilanco kaj Buĝeto, dum la Kongresa Spezokonto de Stokholmo estas promesita por Brazilio. La Financa Raporto estas subskribita nek de ŝtata revizoro, nek de la du revizoroj elektitaj de la Komitato. Tia grave manka Raporto estas ne komprenebla. Ĝi neniel povas doni eĉ ideon pri la reala situacio, tute speciale ne pri tio, ĉu la diversaj elspezoj estis vere necesaj aŭ almenaŭ utilaj el vidpunkto de la celoj de UEA kaj la interesoj de Esperanto. Ekzemple, la tuto de la vojaĝaj kaj restadaj elspezoj de la Estraro, ofi-cistoj kaj komisiitoj estis 52.692 guldenoj (kompare kun 14.764 gld. en 1973), kaj oni prave povas demandi sin kial ili vojaĝis tiel multe, kiajn rezultojn donis tiuj vojaĝoj kaj entute ĉu tiel altega sumo estas pravigebla, se oni ne trovis eĉ iom da mono almenaŭ por eldoni seslingvan faldfolion aŭ por iu alia fakte utila celo (v. supre sub 52.3).

Pro la menciitaj gravaj mankoj kaj prisilentoj ne estas eble komenti la Finanzan Raporton iom pli detale. Tamen, nur du ĝeneralaj rimarkoj:

(i) La Spezokonto montras pozitivan saldon de 649 gld. Kompreneble, se oni "ŝparas" (je la kosto de la MA) unu n-ron de *Esperanto*, ne publikigas la *Duan Parton de la Jarlibro*, ĉesigas kian ajn agadon en la sfero de informado, praktike nuligas IGS kaj la aliajn informbultenojn, ne prizorgas la artikolan servon, malatentas statistikadon, "liberiĝas" de la iam elstara LMLP, likvidas CED, kies ampleksajn taskojn

neniu transprenas, ne organizas kiun ajn mondan kampanjon preterlasante tiel unikajn okazojn, ktp., alivorte: se oni detruas preskaŭ ĉiujn antaŭhamburgajn agadojn, kiuj donadis konstantajn impulsojn al Esperanto kaj daŭre altigadis la reputacion de UEA (parte ankoraŭ ekspluatatan), sed centriĝas al 2-3 profitdonaj entreprenoj, tiam oni devus gajni eĉ multe pli ol 649 guldenojn, kio *sub tiaj kondiĉoj* en ĉiu okazo signifas malgajnon por Esperanto. Tiurilate UEA reduktiĝis al malgranda komerca entrepreno. Ĉu tio, aldone al perditaj neŭtraleco kaj idea sendependeco, estas ĝia celo laŭ la nova Statuto?

(ii) Laŭ la Raporto, fine de 1980 la asocia kapitalo estis 529.694 gld. Pro la supre menciitaj kaŭzoj ĝi povus kaj devus esti pli granda. La Raporto kun fiero akcentas, ke tio estas "rekordo" kaj, inkluzivante la fondaĵojn, per bele desegnita, sed falsa diagramo grafike prezentas la "rekordon". Fine de 1973 (la lasta jaro antaŭ Hamburgo) la asocia kapitalo (sen la fondaĵoj, kompreneble) estis 265.682 guldenoj. Ni ne konas la precizan procenton de la inflacio en Nederlando, sed verŝajne ĝi estis meze minimume 10% jare. Se tiel, la fakta valoro de la asocia kapitalo fine de 1980 estis malpli granda, ol la fakta valoro de la asocia kapitalo fine de 1973. La financaj "specialistoj" de UEA devus scii tion. Serioza Financa Raporto devus ne blufi per blovitaj, inflaciaj "rekordoj", sed objekte prezenti la situacion. Espereble la prezidanto, kiu ja estas specialisto pri financoj, korektos tiun plian blufan rekordon (aŭ rekordan blufon) kaj, antaŭ ol fine subskribi la Raporton, reduktos ĝin almenaŭ tiurilate al realeca dimensio.

Eble troviĝos almenaŭ kelkaj komitatanoj, kiuj maltrankviliĝos pro la tuta situacio de UEA ankaŭ tiurilate. En tiu Raporto pri neagadoj ili ja povas trovi eĉ pli ol "sufiĉe da ekscitaj alineoj", sed certe ne en la senco, en kiu uzis la vortojn inter citosignoj la redaktoro de *Esperanto* sur la interna kovrilpaĝo.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18 de Bep.

53. OFICEJO DE UEA EN BUDAPEŬTO

Laŭ la ĉefartikolo en la maja n-ro de *Esperanto*, UEA malfermis en Budapeŝto "sciencteknikan oficejon". Per tio, laŭ la verkinto de la artikolo, "la Estraro de UEA nun montras, ke ĝi ne restis surda antaŭ la helpokrioj el Irano, kie la novaj lernantoj unuavice serĉas ĝuste tian literaturon" (sciencan). Pretere dirite: jam dum jaroj la organo de UEA informas pri miloj da gestudentoj, kiuj lernas Esperanton en Irano, sed ni estus tre feliĉaj renkonti nur dekon da lernintoj aŭ almenaŭ legi kiun ajn ilian artikoleon en bona Esperanto en kiu ajn periodo. Tiu preteksto por malfermi oficejon en Budapeŝto estas ridinda. La vera motivo devas troviĝi aliloke. La oficejo estas malfermita surbaze de iu kontrakto, kiu, tamen, ne estas publikigita. La subskriban ceremonion en Budapeŝto ĉeestis

la prezidanto kaj la ĝenerala direktoro de UEA. Apenaŭ necesas diri, ke ne nur HEA, sed nun ankaŭ la oficejo de UEA en Budapeŝto troviĝas sub rekta kontrolo de la politika polico, ĉar en unupartiaj totalecaj ŝtatoj ne povas esti alimaniere. Espereble tion scias almenaŭ parto de la nuna membraro de UEA. Kial necesis tiu plia partipolitika kompromitiĝo de la iam neŭtrala kaj sendependa UEA? Se iam aperos unusola vere scienca verko de la Budapeŝta Oficejo, ni certe bonvenigos ĝin.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap.18.2.1 de EeP kaj ĉap.5 de Hamburgo en Retrospektivo (HeR).

54. KONTRAŬ NUKLEAJ ARMILOJ – EN OKCIDENTA EŬROPO

La 14-a "Konsultiĝo de Esperanto-Organizoj de Socialismaj Landoj", fakte organizaĵo de Esperanto-asocioj kaj instancoj sub la gvido de Sovetio en la sino de UEA, akceptis Rezolucion de la 22-a de aprilo 1981, en kiu la subskribintaj organizaĵoj/instancoj (kun la escepto de du, ĉiuj "aliĝintaj asocioj" de UEA) plian fojon atakas la "plej agresemajn imperiismajn rondojn" (kompreneble okcidentajn) laŭ la konata sovetisma politika kaj internacijura doktrino. Interalie, la subskribintoj "senrezerve subtenas ĉiujn sociajn fortojn, organizaĵojn kaj movadojn, kiuj energie kontraŭstaras la fabrikadon de nukleaj kaj neŭtronaj armiloj, destinitaj por lokigo sur la teritorio de okcidenta Eŭropo (nia substreko). Kial ne ankaŭ en Soveta Unio kaj en la blokaj landoj? En la okcidentaj demokratioj jam troviĝas multaj movadoj, kiuj "kontraŭstaras la fabrikadon de nukleaj kaj neŭtronaj armiloj" kaj alian lokigon sur siajn respektivajn teritoriojn, sed en Sovetio kaj ĝiaj Satelitoj estas strikte malpermesitaj, sub minaco de la plej severaj kriminaljuraj punoj, ne sole movadoj, sed eĉ nuraj unuopaj protestoj kontraŭ la fabrikadon de nukleaj kaj aliaj plej teruraj armiloj en Soveta Unio kaj en la aliaj landoj de la Varsovia Pakto. Tamen, nur paralelaj premmovadoj en la landoj de ambaŭ flankoj rilate siajn proprajn grandpotencojn povus pozitive efiki kaj savi la homaron de la plago ne nur de nuklea, sed de kia ajn milito.

La Rezolucion publikigis la organoj de la blokaj Esperanto-organizaĵoj kaj instancoj, inter la aliaj ankaŭ Budapeŝta Informilo de junio 1981. Ne estas konate, ĉu almenaŭ la Budapeŝta Oficejo de UEA protestis pro tiu partieca partipolitika propagando.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.2.1 de EeP kaj ĉap. 5 de HeR.

55. PLIA SENDEPENDA INSTITUTO PRI LA POLITIKIĜO DE UEA

El n-ro 5/80 de *Starto*, organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (aliĝinta asocio de UEA), mi sciiĝis, ke *Swiss Press Review and News Report* en Berno "presis artikolon de sia eldonisto Peter Saver 'Soviets Infiltrate Esperanto Movement'" en n-ro 17 de la 13-a de aŭgusto 1980. *L'esperanto*, organo de Itala Esperanto-Federacio, verŝajne observante la rekomendon de S-ro Renato Corsetti (vicprezidanto de UEA), republikigis la atakartikolon de *Starto*, kaj tiel la duan fojon oni povas legi la saman informon pri la svisa raporto.

Scivolema pri kio efektive temas, mi skribis al la redakcio en Berno. Je mia granda surprizo mi ricevis respondon ne de la menciita svisa periodaĵo, sed de *Schweizerisches Ost-Institut* (Svisa Oriento-Instituto) kun aldonita fotokopio de la originala raporto de la Instituto pri la trafiltiriĝo de sovetistoj en la Esperanto-Movado. La titolo ne estas tute ĝusta, ĉar ne temas pri politikiĝo de la tuta Esperanto-Movado, sed nur de UEA. Kun tiu escepto kaj kelkaj eraroj, interalie pri la karaktero de Esperanto ("artefarita", inventita", k.s.), la raporto de la Instituto estas esence korekta kaj entenas ankaŭ kelkajn pliajn, ĝis nun ne konatajn faktojn, ekzemple pri la Ligo de Sovetaj Societoj por Amikeco kaj Kulturaj Kontaktoj kun Aliaj Landoj, al kiu apartenas ankaŭ Asocio de Sovetaj Esperantistoj (pri la stato de la Esperanto-Movado en USSR v. la artikolon publikigitan en *Horizonto* n-ro 2/81). Jen la Esperanto-traduko de kelkaj partoj de la raporto, kiuj rilatas al UEA:

"En la sepdekaj disfamiĝis informoj, ke la orienteŭropaj Esperanto-parolantoj (fakte nur la altruditaj politikaj gvidantoj, nia rim.) forte klopodas havigi al si gvidan rolon en UEA, speciale en la junularaj organizaĵoj de la Movado".

"La nova Soveta Societo de Esperanto-parolantoj intime kunlaboras kun alia internacia Esperanto-organizaĵo - konata kiel komunista frontorganizaĵo - Mondpaca Esperantista Movado aŭ MEM...MEM estis fondita en 1952-53, verŝajne je la iniciato de la Monda Packonsilantaro, la bone konata komunista frontorganizaĵo kun sidejo en Helsinko. La prezidanto de MEM, Nikola Aleksiev el Bulgario (nun Honora Membro de UEA, nia rim.), estas ankaŭ membro de la Monda Packonsilantaro, kaj la du organizaĵoj havas intimajn ligojn. Ili estis firmigitaj per subskribo de interkonsento pri reciproka subteno kaj kunlaborado en oktobro 1973" 6tuj post la subskribo la sama N. Aleksiev intensigis sian komplotan agadon, kio kondukis al la hamburga puĉo, nia rim.).

"La oficiala organo de MEM Paco publikigas ĉiumonate deklaraĵojn kaj deklarojn, komunikatajn de la Monda Packonsilantaro. Tiu ĉi periodaĵo propagandas ekskluzive la linion de la Moskva Komunista Partio. MEM kaj la Monda Packonsilantaro estas komplete kontraŭ-Okcidentaj, kaj ili prezentas ĉiujn problemojn de paco, detanto kaj malarmedo ekskluzive el soveta vidpunkto - samtempe prisilentante la sovetan sinarmadon."

"Unuarangan ekzemplon de la sovetaj propagandaj fortostreĉoj donis la renkontiĝo, okazinta antaŭ nelonge, de la Esperanto-parolantoj (fakte de la altruditaj partipolitikaj gvidantoj, nia rim.) el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Orienta Germanio, Pollando, Soveta Unio, Hungario kaj, por la unua fojo, Vjetnamio en malgranda urbo en Hungario la lastan aprilon (1980, nia rim.): la okazo estis uzita sole por

kondamni la militan intervenon de Ĉinio en Vjetnamio....Ĉio ĉi montras la realan interesigon de Soveta Unio pri Esperanto".

Laŭ nia scio, tio estas la dua scienca-esplora sendependa instituto, kiu raportis pri la politikiĝo de UEA laŭ la sovetisma linio, sed eble estas ankaŭ aliaj. Tamen, verŝajne troviĝos esperantistoj-naivuloj, kiuj plu kredos, ke tiajn gravajn eventojn - kaj unudirekta politikiĝo de iam sendependaj kaj prestiĝaj internaciaj organizaĵoj, kia UEA, ja estas grava - oni povas "kaŝi" antaŭ la demokrata monda publiko. Cetere, kial kaŝi? En kies intereso? Anstataŭ "kaŝadi", ĉu ne estus pli saĝe - kaj en ĉiu okazo honeste - ŝanĝi tion, kion senespere oni volas kaŝi? La antaŭhamburga UEA havis nenion por kaŝi, kaj tial ĝi ĝuis respekton ĉie en la mondo, eĉ en la landoj, kies totalecaj reĝimoj ne ŝatis ĝian sendependecon, firme ligitan al la partipolitika kaj religia neŭtraleco.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.2.1 de BeP kaj ĉap. 5 de HeR.



URNES-STILO


Detalo de la Urnes-portalo
(laŭ *Kulturbistorisk Leksikon for Nordisk Middelalder*).

La preĝejo estis konstruita inter la jaroj 1130 kaj 1150, kiel la tria sur la sama loko. Sur ĝia norda vando troviĝas portalo origine konstruita por la dua preĝejo inter la jaroj 1050 kaj 1100, je la fino de la vikinga epoko. La ĉizita kadro ĉirkaŭ la pordo prezentas luktantajn fabelajn bestojn. Oni rimarkas i.a. kvarpiedan beston atakatan de drako. Inter kaj ĉirkaŭ la bestoj serpentumas "sarmentoj", ankaŭ en formo de longigitaj vostoj de la bestoj.

En *Horizonto* n-ro 31(1) la artikolo *Vikinga Ekspozicio* sur p. 11 estis ilustrita per bildo kun la klarigo: "Kapitelo laŭ la t.n. Urnes-stilo de Norwich (Anglio)".

S-ro Arne Høgseth, Tromsdalen, Norvegio, atentigis pri tio, ke la teksto estas miskomprenbla. Ĉu la kapitelo aŭ la stilo devenas de Anglio? Fakte, la kapitelo estis trovita en Norvegio, kaj Urnes estas loko ĉe branĉo de Sognefjord en okcidenta Norvegio. Ĉar la tiea mezepoka ligna preĝejo posedas unikan reprezentadon de la koncerna stilo, tiu ricevis la nomon de la loko.

H.V. Rasmussen



angulo de l' pensulo

Mallonge el la tuta Mondo

(En n-ro 33/81 de Informilo, organo de la Orientfranca Esperanto-Federacio, aperis en la rubriko "Angulo de l' Pensulo", pri kiu respondecas nur la aŭtoroj de la kontribuajtoj, longa artikolo de Eugène de Zilab sub la supra titolo. En ĝi tiu klera, kapabla, juna kaj nova esperantisto, unu el la plej aktivaj kunlaborantoj de la revuo Monato, prezentas siajn impresojn pri la 6-a Internacia Konferenco de N.E.M., tute speciale pri sia unua renkontiĝo kun Prof. D-ro Ivo Lapenna. Sube ni publikigas kelkajn partojn de la artikolo. — La Redakcio).

RENKONTIĜO KUN IVO LAPENNA

Nu, ankaŭ mi havis bonŝancon ĉi-somere interkonatiĝi kun unu el la plej famaj famuloj de la Esperantista Movado.

Li sidis apud la prezidantara tablo de la ĉi-aŭgusta N.E.M. kongreso en Strasburgo. Jam antaŭ longa tempo mi ellegis plurajn el liaj libroj kaj ankaŭ artikolojn pri li; mi do sciis, ke li aĝas pli ol 70, kaj timis ke mi ne rekonos lin laŭ antaŭ-dudekjaraj fotoj; sen kialo! Tuj mi rekonis lin, laŭŝajne de dudek jaroj li ne maljuniĝis. Liaj longaj fingroj nervoze tamburadis la tablon: post 50-jara aktivado li ankaŭ esperas, ke kunveno povas komenciĝi je preciza horo, kaj esperantistoj kapablas ne malfruiĝi. Milfoje ripetita eraro iom malheligas lian humoron. Lia vizaĝo, longaj dalmataj trajtoj kun esprimo iom malgaja, regas romiajn sulketojn kaj apud la buŝo du memkonsciajn faldojn de iu enuanta angla lordo. Sidante malantaŭ la tablo, li tamen ŝajnas tre alta, aŭ nur mi fantazias, ĉar en nia franca lingvo ni ne diferencigas inter famuloj, altuloj kaj granduloj. Liaj vestoj estas britaj, ĉu grizaj? Jes, eble grizaj. Entute li estas timiga aĉaĵo por freŝbakito kiel mi. Mi eĉ decidis nenion diri dum la tuta kongreso (sed, kiam mi silentas, la ceteraj diras pli da stultaĵoj ol mi, do mi sentas min devigita ekvilibrigi la pesilon, sekve mi tamen ekparolis).

Poste li oratoris. Memkompreneble mi sciis, ke oni konas lin kiel la unuan oratoron de la Movado. Tamen mi ekmiris pro la klareco, beleco, logiko de lia parolado. Aktoroj povas tiel paroli la francan en Parizo aŭ la anglan en Londono, sed mi neniam kredis, ke iu kapablas tiel la internacian. Poste oni diris al mi en Jugoslavio, ke la serba-kroata lingvo, gepatra lingvo de Lapenna, kunmetiĝas el samaj sonoj kiel Esperanto, kaj en Zagreb mi konvinkiĝis ankaŭ pri tio, oni parolas la plej belan Esperanton. Tiel bele li parolis ke, komence, mi eĉ ne atentis kion li diras; mi nur gustumis la sonojn, harmonion kaj ekvilibron de liaj frazoj

Mia mirado kreskas, kiam la kongresanoj ekhavas la Statuton de la nova organizaĵo NEM (fakte Centro de N.E.M.). Nur temas pri iuspeca Kultura Centro kun ĉefa celo eldoni revuon HORIZONTO, en kiu povas verki tiuj, kiujn UEA-cenzurado malhelpas verki en la revuo ESPERANTO.

Mi miras ankoraŭ pli, kiam temas pri la havaĵoj de N.E.M.. Kiam (sed kiam?) UEA revenos al partipolitika neŭtraleco, ĉiuj havaĵoj de N.E.M. fariĝos proprajoj de UEA kaj N.E.M. malaperos.

Dum bankedo mi sidas apud Lapenna, kaj mi povas fari al li kelkajn demandojnनावन de iu, kiu eĉ ne estis esperantisto en 1974. Li klarigas al mi, ke grandan parton de lia vivo li donis por konstrui UEA, por ke ĝi estu respektata, granda, potenca mondorganizaĵo. N.E.M. devas ekzisti por ke neniu kapablu detrui UEA-n. Nepras, ke iu organizaĵo ekzistu por ke esperantisto, kiu ne kapablas elteni en UEA, ne falu eksteren de la Movado

... Li ridetas, kaj promesas al mi trovi tempon por verkadi artikolojn por MONATO. Multe da homoj malamas Lapenna-n. Pro rivaleco? Pro certo pri alia vero? Pro ĵaluzo? Pro malsimila karaktero? Mi ne devigas min ekhavi propran opinion. Lapenna fascinas min, li estas tiom kompleksa, kaj, antaŭ mi, novulo, li estas parto de movada historio, samkiel se mi interparolus kun Baghy aŭ Kalocsay, jam bedaŭrinde mortintaj.

Eugène de ZILAH



KURSOJ EN LA UNIVERSITATO DE MANCHESTER, ANGLIO

Holly Royde 1981

La oka jara semajnfino de lekcionoj kun diskutoj en Esperanto okazos de la 16-a ĝis la 18-a de oktobro en la universitata kolegio, Holly Royde. La gastprelegontoj, D-rino Marjorie Boulton kaj S-ro A.W. Rowe, kontribuos po tri lekcionoj, aldone al la tri proponotaj de la direktoro.

Ĉinio

Oni atentigu aparte pri tiuj de S-ro Rowe pri Ĉinio, traktontaj la nekomplete komprenatan karakteron, kaj la al ni tutstrangajn lingvojn de tiu lando, kaj ankaŭ ties modernajn aspektojn, sociajn kaj lingvajn. Nin tiu enorma mondkvarono aparte interesas ĉar tie (kiel cetere en Japanio) Esperanto bele floras, spite de la fundamentaj diferencoj inter la lingvoj orientaj kaj tiuj de Eŭropo, el kiuj la vortaro de Esperanto ĉefe devenas.

La bonegaj lekciĉambroj, loĝĉambroj, kaj manĝoj en Holly Royde estas nun bone konataj inter ni. Aliĝilojn oni petu frue de "The secretary for enrolment, Extramural Dept., The University of Manchester, M13 - 9PL, kaj resendu kun la mono antaŭ la 2-a de oktobro. La tutinkluziva kosto estas proks. 32 pundoj por najbarprovinccanoj; iomete pli por aliaj. Kiel kutime, ankaŭ nebritoj estos aparte bonvenaj.

Bernard Cavanagh, D.Sc., la Direktoro.

Noto: La redakcio de *Horizonto* varme rekomendas tiujn unikajn Esperantlingvajn kursojn sur universitata nivelo.

Tra la Esperanto-Gazetaro

Redaktas JEAN THIERRY

El "CENTRA BULTENO", organo de Esperanto-Centro Århus...

En la numero 166 de la sveda "MUNDO", kiun entenas la numero 184 de C.B., denove aperas artikolo favore al at-ismo: bedaŭrinde por la unueco de la lingvo! Sed en la numero 185 de junio interesa perspektivo pritraktas, kiuj estos la "dek plej grandaj lingvoj de la mondo" en la jaro 2000: tiam la hispana post la ĉina devus superi la anglan! En la numero 190 de la 20-a de julio jam aperis la rezolucio de la 7-a Internacia Konferenco de N.E.M.: rimarkinda rapideco! Kaj en numero 192 de la 3-a de aŭgusto estrarano de Dana Esperanto-Asocio, Georg Kustos, partopreninte la konferencon, prezentis la Skizon de Baza Programo por la Esperanto-Jaro 1987 kun tutpaĝa komento, i.a.: "Tutkore kaj persiste mi petas ĉiun unuopan membron de la landaj, fakaj kaj ĉiu ajn alia asocio (inkluzive UEA) kunlabori rilate al la unika ebleco disvastigi Esperanton pere de la baldaŭa datreveno. Gravus ja nur la rezulto de niaj klopodoj, senrigarde ĉu la planoj devenas de NEM aŭ UEA."

El "der esperantist" (n-ro 105-jan. 1981) intervjuo de la prezidanto de Monda Federacio de Demokrata Junularo (MFDJ) deklaras: "La celoj de MFDJ kaj tiuj de TEJO estas grandparte la samaj... Nepre necesas, ke kunlaboro ekzistu ne nur sur la nivelo de la internacia estraro, sed ankaŭ la unuopaj naciaj junularaj organizoj daŭre kunlaboru kun la lokaj organizoj de TEJO. Ĝenerale estas nia principo, ke la naciaj membro-organizoj de MFDJ - surbaze de siaj memstareco kaj sendependeco - serĉu la kontaktojn kun la naciaj membro-organizoj de ĉiuj internaciaj organizoj, kun kiuj ankaŭ la Centra Oficejo de MFDJ kunlaboras." Por saĝulo sufiĉas aludo! Artikolo de Detlev Blanke prezentas interesan labor-programon pri "Informado kaj argumentado"; kaj Linde Knöschke "kelkajn pensojn pri la traduko de nacilingvaj specifaĵoj", interalie: "Aŭtoroj el socialismaj landoj ne imitu la oblikvan lingvouzon de okcidentaj amasmedioj. La Konsilantaro por Reciproka Ekonomia Helpe ne estas Komekono. Terminu particiĉfo nur kaŝas nescion de la korekta (ĝusta) titolo de la koncerna funkciulo kaj terminu politpastroj ne indas por grupo de progresivaj katolikaj pastroj. Ni ne uzu finnlandigon por desegni (signi) aktivan agadon en la senco de la Helsinki-konferenco." Ej! Ej! Li avertas kontraŭ misuzo de terminoj almenaŭ misaj laŭ lia opinio, sed li ne indikas pli bonajn!

El "OOMOTO" (jul.-dec. 1980) elstaras kontribuajtoj de Eizo Ito pri kongreso de Mondfederistoj kaj Mondcivitanoj; - de W.Gilkey pri la Historio de Omoto kaj intervjuo kun David Kidd; de Bernard Golden: "Kiam okazis la unua interparolado en Esp-o?"; de d-ro Jaime Scolnik: "Orelaj malsanoj".

El "SENNACIECA REVUO" (n-ro 109/1981) elstaras tre valoraj artikoloj: - pri la historio de la urbo Bazelo, fare de Helmut Hubacher; - pri Frederiko Nietzsche, sub la plumo de S.Aarse; - pri la kojnoskribo kaj la Asiri-Babilonia lingvo, rimarkinda prezento de Bernard Golden koncerne al unu el la plej malnovaj skrib-sistemoj en la mondo; - pri naciismo kaj universalismo en muziko, laŭ NBartelmes; - pri "la homa fenomeno" laŭ Theilhard de Chardin en traduko de Alberto Fernandez; - kaj fine pri la duvoluma romano titolita "Di-Reĝoj", sinoptika priskribo de ĉefaj faraonaj agoj. La tuto konsistigas bukedon da kulturaj valoroj malofte renkonteblan en Esperantio!

El "BUDAPEŝTA INFORMILO" (julio 1981) S.Osias rekomendas la partipolitikecon de la esperantistaj asocioj: *"Pro historie iĝintaj kialoj ĝis nun la esperantistoj ne nur ne zorgis por ke la progresivaj partioj enigu en sian celaron ankaŭ Esperanton, sed ili erare proklamis la esperantistan movadon kiel neŭtralan kaj tute ne volis rilati kun la politikaj partioj."* (Substreko mia). Jen deklaro pri partipolitikigo tute klara! La intence blindaj membroj de U.E.A. bonvolu malfermi la okulojn!


El "l'esperanto" (n-ro 10 1980), revuo de la itala federacio, eklevas sin la voĉo de la redaktoro Aldo de'Giorgi en trafaj rimarkoj pri la voĉdonadoj de la UEA-komitataj kunsidoj.

Pri la elekto de la Estraro kaj pri multaj aliaj decidoj alprenitaj de la Komitato de UEA en la pluraj kunsidoj mi devas tamen konfesi, ke ĉi-foje mi ricevis ne tute pozitivajn impresojn. Se mi memoras la ekscitajn foje eĉ akrajn debatojn de la pasintaj jaroj, ŝajnis almenaŭ strange, ke ĉi-jare la plejmulto de la decidoj estis voĉdonitaj preskaŭ sen antaŭa diskutado, plejofte unuanime aŭ kun nur kelkaj sindetenoj. Ĉu nia plej alta decida organo fariĝis abrupte plenkonkorda? Mi iom skeptikas pri tio - mia politika sperto instruas min, ke kie ne estas diskutado, kie estas troa unuanimeco, tie ĝenerale ankaŭ ne estas troa demokratio. Ankaŭ la elekto de la Estraro okazis preskaŭ sen kontrastoj kaj la ok nomoj proponitaj de la elektokomisiono (tiukaze la "griza eminenco" de la Komitato, ia Estraro-en-la-Estraro) estis voĉdonitaj sen eblo de alternativo, ĉar ankaŭ la disponeblaj postenoj estis ok. Same iom stranga ŝajnis al mi la voĉdonado pri la buĝeto de UEA, kie la protokolo preparita de trimembra komisiono ricevis de tiuj samaj tri homoj unu aproban, unu kontraŭan kaj unu sindetenan voĉojn. Mi rimarkis krome - kaj tio jam delonge - ke almenaŭ du trionoj de la Komitatanoj partoprenas la komitat-kunsidoj neniam dirante unu vorton, neniam esprimante sian opinion, nur levante aŭtomate la brakon por aprobi kion ajn...

Ĝenerale nur maksimume kvarono de la aliĝintoj diligente partoprenas la "laborajn" kongresajn programojn. La aliaj aliĝas preskaŭ ekskluzive por turismaj celoj, dum la tuta kongresodaŭro ili butikumas, vizitas kaj ekskursas - kaj nur sporade (okaze de la balo, teatro, oficiala akcepto, koncertoj kaj maksimume inaŭguro kaj fermo) piedmetas en la kongresejon. En Stokholmo el la 1800 kongresanoj maksimume 100 homoj meznombro - ĉiam la samaj - vizitis la respektivajn debatojn, prelegojn, seminariojn, ks.

Ĉu komenton necesas aldoni, por ke ni en N.E.M. ĉesu ludi rolon de nura Kasandra kaj fine la gemembroj de UEA komprenu, kio okazis en Hamburgo dum la Universala Kongreso de 1974?

J.T.



INTERNACIA CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Koresponda adreso: S-ro cand.oecon. H.V. Rasmussen, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danio.

FONDO KAJ CELOJ

Dum la 6-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, okazinta en Strasburgo en 1980, estis fondita la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM).

Unu el la celoj de la Centro estas manifesti kaj interne de la Esperanto-Movado kaj ekster ĝi la tradiciajn kulturajn kaj ĝenerale ideajn valorojn de la partipolitike kaj religie neŭtrala Esperanto-Movado.

La Centro kunordigas la laboron de ĉiuj neŭtralaj Esperanto-organizaĵoj, kiuj deziras tion. Ĝi kreas financon bazon por certigi aperadon de *Horizonto* kaj de aliaj publikaĵoj, kies linio konformas al la celoj de la Centro kaj al la *Deklaro de Principoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado*.

La Centro tute ne celas fariĝi amasa Esperanto-organizaĵo aŭ konkurenci al kiu ajn Esperanto-societo. Tial ĝi havos nur limigitan nombron da ordinaraj membroj.

MEMBRECO

Kiel ordinara membro povas esti akceptita ĉiu persono, kiu parolas la Internacian Lingvon kaj ĉiu Esperanto-organizaĵo, kiu agas konforme al art. 2 de la Statuto. Krome fizikaj kaj juraj personoj povas esti akceptitaj kiel neordinaraj membroj. Informoj pri membrokategorioj kaj iliaj kontribuoj kaj kotizoj troviĝas en la sube menciitaj broŝuro kaj aliĝilo.

PLENUMA KOMITATO

En Strasburgo estis elektita la unua, provizora Plenuma Komitato, kies ĉefa tasko estas ekfunkciigi la Centron, kaj kiu konsistas el:

Prezidanto Prof. D-ro IVO LAPENNA, 77 Grasmere Avenue, Wembley,
HA 9 8TF, Middlesex, Britio.

Vicprezidantoj D-ro KLAUS PERKO, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio.
S-ro JEAN THIERRY, 5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio.
F-ino MARIANNE VERMAAS, Nieuwe Binnenweg 70, I.R. 3015 BC
Rotterdam, Nederlando.

Sekretario-kasisto S-ro H.V. RASMUSSEN, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danio.

LA CENTRO KAJ HORIZONTO

Ĉiuj membroj de la Centro ricevas senpage la revuon *Horizonto*, sed tiu periodaĵo, eldonata de la *Eldonejo Perspektivo*, estas ankaŭ aparte abonebla rekte ĉe la eldonejo aŭ pere de la perantoj, kies nomoj kaj adresoj aperas sur la dua kovrilpaĝo.


ALIĜILOJ KAJ PAGOJ

Apartan broŝuron kun la Statuto de la Centro, Deklaro de Principoj, Rezolucio de la Konferenco de Ateno, ĉiujn aliajn informojn kaj aliĝilon bonvolu havigi ĉe la sekretario-kasisto. Li akceptas la aliĝojn kaj kotizojn (postĉeka konto de la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado: Kopenhago 1 19 06 01). Bonvolu atenti: Se por iu deziranta aliĝi estas pli facile pagi al la prezidanto aŭ al unu el la vicprezidantoj, li/si povas pagi la kotizon ankaŭ tiamaniere, kaj la koncerna funkciulo de la Centro ordigos tion kun la sekretario-kasisto.

VERKOJ DE IVO LAPENNA

Verkitaj en la Internacia Lingvo.

*Ĉiuj inspiritaj de humaneca
internaciismo.*



Ĉiuj verkitaj en **modela Esperanto**.

El la verkaro de Ivo Lapenna en la kroata, la franca, la angla kaj la Internacia Lingvo kaj japana traduko de Retoriko.

RETORIKO, la plej legata libro de la postmilita periodo, jam pli ol 5.500 ekzempleroj disvenditaj, 3-a eldono, 294 p., bindita, prezo 8 anglaj pundoj, 80 danaj kronoj aŭ egalvaloro, 2-a eldono, bindita, nur 6 anglaj pundoj aŭ 60 danaj kronoj (nur kelkaj ekzempleroj).

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ, komplemento de *Retoriko*, 152 p., fortike broŝurita, prezo 5 anglaj pundoj, 50 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

AKTUALAJ PROBLEMOJ DE LA NUNTEMPA INTERNACIA VIVO, polularscienca kaj interesa por ĉiu klera persono, broŝurita, prezo 3 anglaj pundoj, 30 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

ESPERANTO EN PERSPEKTIVO (ĉefaktoro kaj ĉefredaktoro), monumenta, reklamata de UEA kiel "enciklopedio de la nuna tempo", tamen ne komplete sen *Hamburgo en Retrospektivo*, bindita, ilustrita, 876 p., ampleksaj persona kaj tema indeksoj, prezo 84 ned. gld., 215 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO, konsiderinde kompletigita eldono, lukse broŝurita, 152 p., prezo 5 anglaj pundoj, 50 danaj kronoj, 18 germanaj markoj, 40 fr.fr., 650 pesetoj aŭ egalvaloro.

Prezoj ekde la 1-a de junio 1979. Ĉiuj supraj libroj estas en la sama formato de 20,5 x 14 cm.

Mendeblaj ĉe nia **LIBROSERVO de NEM**, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danlando. Kun ecepto de *Esperanto en Perspektivo*, la librojn oni povas mendi ankaŭ ĉe la *aŭtoro*: 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex HA9 8TF, Britio, laŭ la prezoj indikitaj en anglaj pundoj.

Krome, unuopaj ekzempleroj de *Hamburgo en Retrospektivo* estas mendeblaj ĉe s-ro *Jean Thierry*, 5, rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio, aŭ ĉe bonaj libroservoj. Pli grandaj kvantoj mendeblaj nur ĉe **ELDONEJO PERSPEKTIVO**, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danlando, kun jenaj rabatoj: 33% ĉe mendo de minimume 5 ekzempleroj plus 10% por afranko, 33% sen afranko ĉe mendo de minimume 10 ekzempleroj.

En ĉiuj aliaj kazoj bonvolu ĉiam aldoni 10% por la afranko.

LA SUPRAJ VERKOJ DE IVO LAPENNA estas pli aktualaj nuntempe ol iam antaŭe. Ili donas klaran, science bazitan eksplikon pri la esenco de la Internacia Lingvo (Esperanto), pri ĝia rolo en la hodiaŭaj kaj estontaj internaciaj rilatoj kaj pri ĝia monde solidariga funkcio. Samtempe, kune kun la artikoloj en *HORIZONTO*, ili estas la plej trafa respondo al la pseudosciencaj skribaĵoj de la sovetismaj ideologoj en la posthamburga UEA kaj ĝenerale en la Esperanto-Movado.

MENDU TIUJ KAJ ATENTIGU VIAJN GEAMIKOJN

Helpu pluporti la torĉon de la *zamenbofa esperantismo*

LIBROSERVO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO,
Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danlando.